Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO AŬGUSTO 2009, JARKOLEKTO 27
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019
esperantobob@iprimus.com.au
Legeblas ankaŭ surrete: www.gazetejo.org

La sekvan ŝercon elangligis, eĉ tre majstre, Nicole

Maljuna viro posedas grandan bienon kun lageto. Dum somera varmega vespero li iras proksimen al la lageto, kie estas pomarboj. Li kunprenis sitelon por kolekti pomojn.

Subite li aŭdas gajajn voĉojn de junulinoj. La junulinoj suferis iom pro la varmego kaj decidis profiti de la lageto por malvarmiĝi kaj naĝi. Ĉar ili ne antaŭplanis tion, ili kompreneble banas sin nudaj. Subite la virinoj vidas la maljunulon alproksimiĝi kaj ili iras pli profunden en la akvon por ke la maljunulo povu vidi nur la kapojn. Unu el la junulinoj krias:

"Ni ne eliros el la akvo ĝis kiam vi estos for". Tuj la maljunulo respondas ke li ne venis al la lageto por observi nudajn virinojn, sed por nutri la krokodilon. Dirante tion li ja montras la grandan sitelon, kiun li kunportis.

Iuj maljunuloj ankoraŭ kapablas rapide kaj lerte reagi.

La ĉefkuracisto de la psikmalsanulejo bonvenigis la novajn flegistlernantinojn laborontajn en la kliniko: "Knabinoj, dum via laborado vi kontaktos sadistojn, neŭropatojn, bruligemulojn kaj alkoholulojn. Tiom pri la stabo. La malsanuloj estas grandparte simulantoj.

La unua lingva festivalo en Aŭstralio

En diversaj Esperanto-revuoj legeblis plurfoje raportoj pri sukcesaj lingvaj festivaloj, kaj Dennis Keefe detale prezentis la temon dum la Jokohama UK. Kiu provu la recepton en Aŭstralio?

La kuraĝuloj estis ges-roj John kaj Elray Adams el Torquay, Viktorio. En ilia urbeto okazis ĉi-junie la dua "The Torquay Froth & Bubble Literary Festival". La geedzoj Adams aktive partoprenis en la organizado de la aranĝo, kaj

ĉi-foje enkondukis en ĝin ankaŭ lingvan festivalon. La celo estis prezenti diversajn kulturojn kaj lingvojn, unu el kiuj estu Esperanto. Ĉi-maniere oni ne nur sentrude flegas la estimon al diverseco kaj al lingvoj ĝenerale, sed donas ankaŭ bonan okazon por konatigi al la publiko niajn proprajn lingvon kaj ideojn.

La 2an de junio estis prezentitaj al la scivolemuloj Esperanto, la hispana, la signolingvo Auslan, la slovaka, slovena, itala, litova, ĉina kaj japana lingvoj. La serion de 30-minutaj prelegoj gvidis Alan kaj Jenny Bishop. Jenny estis tiu, kiu "servis" al la ĉeestantoj Esperanton. Ŝi elstarigis la kialojn por aldoniĝi al la esperantistaro, montris la alfabeton kaj kelkajn ekzemplojn de la gramatiko. Ĉion ĉi helpis la bonkvalitaj varbafiŝoj el Sidnejo, projekciataj tekstoj-bildoj, ekzempleroj de ESK, la flago k.a.

La vorto "Esperanto" aŭdiĝis dum la tago ankoraŭ multfoje.

Enkondukante la ceterajn prelegantojn Alan ĉiam atentigis, ĉu la koncerna persono estas esperantisto. Kaj li ja havis kelkajn okazojn por tio, ĉar la slovakan prezentis mi, Auslan Miranda Lutz kaj la japanan Marumi Smith. Nia lingvo altiris atenton ankaŭ dum la vespera festmanĝo kaj ni volonte prezentis ĝin al la ĉetablaj interesiĝantoj.

Kiel taksi la aranĝon? Sukceso. Ne ĉeestis ĝin grandaj homamasoj, ni ne gajnis surlokajn aliĝintojn al Esperanto-kurso, tamen, ni bone informis pri ni, ankaŭ pere de la programbroŝuroj, ni montris nian agemon per aktiva organizado kaj partoprenado en la aranĝo, ni mem spertiĝis en la preparado de lingva festivalo, lernis pri la kulturoj kaj lingvoj de la aliaj kaj plifortigis niajn interesperantistajn ligojn.

La Torquay-festivalon ĉeestis entute 13 esperantistoj, el kiuj pluraj el Melburno kaj mi el Adelajdo. "Mi levas mian ĉapelon" antaŭ la ĉiam modestaj John kaj Elray Adams, kiuj alprenis la riskon kaj laboron provi ion novan. Ilia vojo certe estas imitinda.

Katja Steele

Petro ne fartis tre bone hejme. Ĉimatene li alvenis al la laborejo dirante:

”La edzino piedfrapis min el la lito, enverŝis varmegan kafon en mian gorĝon, malsupren puŝis min laŭ la ŝtuparo kaj brufermis la pordon. Danke al Dio ke ŝi ne estis ankaŭ malbonhumora, ĉu ne?”

Estimataj gastoj vizitis Adelajdon

Sabaton la 11an de julio vizitis Adelajdon Paul Desailly, la verkinto de la fame konata verko ”Realigas la Mondan Pacon la Bahaa Kredo kaj Esperanto”, Velanta kaj ilia ĉarmega fileto. Katja kaj Trevor Steele veturigis ilin al Semaphore.

Ili venis el Sidnejo, sed nun ili loĝas en Sudaŭstralio, do ni esperegas estontece revidi ilin fojon post fojo.

Ni promenis iomete laŭ la marbordo ĝuante la akran vintran venton, ĝis fine ni cedis al unu el la multaj bonegaj kaftrinkejoj laŭ Semaphore Road.

Ni ĉiuj ĝuegis nian kunestadon kaj esperas, ke tiu ĉi evento ne estos la sola, kiun ni travivos.

Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio

Estas jam la mezo de la jaro, aŭ eĉ pli, kaj ĝis nun ni vidis nenion pri TEVA. Surprizo, ĉu ne?

Nu, kiel la nomo diras, TEVA estas asocio de esperantistaj vegetaranoj. Vegetaranoj manĝas nur laŭleĝajn nutraĵojn, laŭleĝajn laŭ la naturleĝoj. Ili rifuzas manĝi, pro diversaj malsamaj kialoj, la karnon de la aliaj vivuloj, kun kiuj ni dividas kaj ĝuas la benojn kaj bonaĵojn de tiu ĉi nia Tero.

Tio signifas grandparte, ke vegetaranoj estas iom pli sanaj, energiaj kaj laboremaj ol karnomanĝantoj. Tio estas komprenebla afero, ĉu ne? Kaj kvankam ankaŭ Hitlero estis vegetarano, la plej multaj vegetaranoj rifuzas preni parton en militoj kaj revolucioj. Tial oni nomas ilin pacamantoj. Ili ne nur parolas pri mondpaco, sed faras ion por ke tio realiĝu.

Estas kompreneble multaj, eĉ tre multaj, vegetaranoj en la mondo. Pli multaj ol estas membroj en TEVA. La TEVA-anoj provas persvadi vegetaranojn lerni kaj uzadi Esperanton samtempe provante persvadi esperantistojn

fariĝi vegetaranoj. Ne nur por siaj propraj sano kaj bonfarto, sed ankaŭ pro amo al bestoj kaj aliaj.

Mi estas la Landa Reprezentanto de TEVA en Aŭstralio. Antaŭ kelkaj jaroj multaj aŭstraliaj esperantistoj membris en TEVA, sed, eble pro mia mallaboremo, nun restas neniu. Estus laŭ mia opinio bone, se tiuj eksmembroj remembriĝus, kaj eĉ pli bone, se ankaŭ multaj aliaj farus same.

Ĝis nun oni ricevis unu grandan, belan kaj bone verkitan revuon, sed nur unu fojon ĉiujare. Ni planas kaj intencas aperigi tiun revuon du fojojn ĉiujare, do tial ni petegas vin ĉiujn konsideri la gravecon de tiu ĉi alvoko.

Membreco ne estas multekosta. € 20 estus bonvenaj, sed se, laŭ vi, tio estas tro, ni akceptos ankaŭ malpli. Aliĝu al la komunumo de vegetaranoj kaj ekĝuu la vivon.

Vian kotizon bonvolu sendi al la Landa Reprezentanto de Aŭstralio, Bob Felby, 6 Dorset Street, Semaphore Park, S.A, 5019.

”Kiam mi aĉetis tiun aŭtomobilon, la vendisto diris, ke ĝi daŭros mian tutan vivon!”

”Vi sendube aspektis tre malsane tiun tagon.

Legio de Bona Volo

La espereble jam mondkonata ”Legio de Bona Volo” situanta en Braziljo, la ĉefurbo de Brazilo, en kiu troviĝas ĝia Templo de Bona Volo, en unu el siaj komunikiloj mencias unu el niaj lokaj esperantistoj, kaj nia Bob Felby, tiu, kiu redaktas ”Tamen Plu” sentas sin tre honorata, kvankam ni, kiuj pli bone konas lin, multe pli bone ol li mem, scias, ke li fakte ĉiam estas treege humila kaj modesta, ĉu ne?

La honoro al Bob okazis pro la artikolo aperinta en la junia numero de Tamen Plu, en kiu menciatis ke La Bona Volo ekumene elsendas sian mesaĝon pri Paco kaj Frateco pere de radio kaj televido. LBV ŝatas, uzas, subtenas kaj instruas Esperanton proksimume 60 jarojn kaj eĉ antaŭ 20 jaroj konstruis la belegan Templon de Bona Volo.

Tiuj el niaj legantoj, kiuj serioze interesiĝas pri Esperanto kaj LBV rigardu http://www.boavontade.com/inc/interno.php?cm=77172&cs=63&ci=6

La kuracisto ordonis al la dikulo, ke tiu malplipeziĝu. Li provas pliĝojigi lin dirante: "Kompreneble vi rajtas manĝi tion, kion vi preferas. Jen listo de tio, kion vi rajtas preferi !"

Gravaj Esperanto-okazaĵoj:

Merkredon la 5an de aŭgusto je la 18a horo ni renkontiĝos en la Box Factory Community Centre, 59 Regent Street South, Adelajdo 5000.
De vendredo la 21a ĝis dimanĉo la 23an de aŭgusto okazos Somerkursaro de Korea Esperanto-Junularo.
Merkredon la 2an de septembro je la 18a horo ni renkontiĝos en la Box Factory Community Centre, 59 Regent Street South, Adelajdo 5000.
Iam en septembro Katja invitos la virinojn al sia hejmo por florarangĝado. Necesos trovi okupadon por la viroj.
Merkredon la 7an de oktobro je la 18a horo ni renkontiĝos en la Box Factory Community Centre, 59 Regent Street South, Adelajdo 5000.
La jam populara kantofesto ĉe Indrani okazos ĉijare la 24an de oktobro.
Merkredon la 4an de novembro je la 18a horo ni renkontiĝos en la Box Factory Community Centre, 59 Regent Street South, Adelajdo 5000.
Sabaton la 7an de novembro ni posttagmezumos ĉe Trevor.
La AEA-kongreso okazos de la 27a ĝis la 30a de novembro en Kanbero.
Merkredon la 2an de decembro je la 18a horo ni renkontiĝos en la Box Factory Community Centre, 59 Regent Street South, Adelajdo 5000.
Dimanĉon la 13an de decembro ni, ĉe Indrani, festos la 150an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof.
La Novzelanda Kongreso okazos verŝajne de la 3a ĝis la 9a de januaro 2010.
La AEA-Somerkursaro okazos en Sidnejo de la 10a ĝis la 25a de januaro 2010.

En 2010 la Universala Kongreso de Esperanto okazos refoje en la belega urbo Havano, Kubao.
Inter la 9a kaj 23a de julio 2011 ni celebros la centjariĝon de AEA, kies unua kongreso okazis en belega Adelajdo en la benita jaro 1911. Espereble kunkongresos ankaŭ ILEI.

”Kio en la mondo okazis al tiu kuko, kiu staris sur la tablo?” demandis la patrino sian etan filinon.
”Mi timis, ke la muŝoj manĝu ĝin, tial mi kaŝis ĝin”.
”Kie vi ĝin kaŝis?” demandis la patrino.
”En mia stomako”, respondis la filino.

Vizitis nin britdevena irlandano

Esperantisto, verdulo, vegetarano kaj IJK-organizanto: Christopher Fettes

Sed ne simpla esperantisto, verdulo, vegetarano kaj IJK-organizanto. Kiel esperantisto li ekigis familian Esperanto-tradicion, ĉar li instruis nian lingvon al sia nevo Mark Fettes (plurjara funkciulo de UEA), kiu pludonis ĝin al siaj infanoj. Kiel verdulo – li estis la fondinto de la verdula partio en Irlando kaj kunfondinto de la Asocio de Verduloj Esperantistaj. En la kampo de vegetarismo li estas honora membro de la International Vegetarian Union kaj prezidanto de la Tutmonda Vegetarana Asocio. Kaj kion li faris por Internaciaj Infanaj Kongresetoj de UEA? Li iniciatis enkondukon de konstanta respondeculo pri ilia organizado, tiel levante la ĝeneralan nivelon de la aranĝo.

Kiel komenciĝis la verdula partio en Irlando? Christopher Fettes faris en 1971 prelegon al *Asocio por natursaneco en Irlando* kun titolo: *’Kial ni bezonas biopolitikon?’* ”Kompreneble, tiu vorto ne ekzistis antaŭ ol mi kreis ĝin” – diras Christopher. Li sciis, ke liaj altaj postuloj ankoraŭ ne estas plenumeblaj kaj ne surpriziĝis, ke la nur dudeko da ĉeestantoj ne montris granda interesiĝon pri la temo.

Kiam en 1975 okazis tutlandaj parlamentaj balotoj en Novzelando, Christopher estis tie. ”La atenton de la voĉdonantoj altiris nova partio *Values Party,* kies ideojn mi trovis ege simpatiaj”. Jaron poste fondiĝis la *Verda Partio* en Germanujo kaj baldaŭ la *Ekologia Partio* en Britujo. ”Ĉiuj tiuj eventoj revivigis miajn intencojn kaj fine de 1981 mi kaj

miaj amikoj kunvokis kunvenon, al kiu venis 70 homoj. Ili estis membroj de asocioj por protektado de bestoj, kontraŭ vivisekcia asocio, amikoj de la Tero, kontraŭantoj de la uzado de atoma ernergio kaj simile. Ni disdonis al ili la anglalingvajn informilojn de la brita ekologia partio kaj alvokis al unuiĝo de niaj fortoj en irlanda ekologia partio. Ni sukcesis. Proksimume 50 el la ĉeestantoj fondis *Ecololy Party of Ireland.”*

“Sekvis periodo de interna bolado – ideoj, diskutoj… Ni baldaŭ trovis taŭgan nomon en la gaela lingvo *Comhaontas Glas,* per kiu ni estas daŭre konataj en la Eŭropa movado verda. Ses monatojn poste estis parlamentaj balotoj. Ni konsciis, ke ni estas ”tro junaj”, sed ni uzis la okazon por disdoni varbfoliojn. Post pliaj 18 monatoj refoje estis balotoj. Tiam ni jam havis grupojn en pluraj lokoj kaj ni anoncis 7 kandidatojn por la parlamento. Sukcesis neniu – kaj tion ni antaŭvidis.”

”En 1984 okazis balotoj por la Eŭropa Parlamento. Oni elektis min kandidato por Dublino. Mi ricevis ne multe, sed sufiĉe da voĉoj por altiri atenton de la homoj?” – memoras la evoluon Christopher.

”Finfine en 1989 la verduloj havis unu membron en la irlanda parlamento. Nun, en 2009, ses el la 168 tieaj parlamentanoj estas verduloj. Unu el ili estas la ministro pri energio, unu ministro pri medio, alia subministro pri nutrado. Ni devis kompromisi, aldoniĝi al alia partio. Bedaŭrinde, la aktuala monda ekonomia krizo bremsas la realigon de pluraj el niaj ideoj pro la manko de necesaj financoj (ekz. konstruado de pluaj fervojaj linioj). Tamen, ni havas ankaŭ atingojn. Unu el ili estas deviga postularo rilate energikonsumadon ĉe konstruado de domoj.”

”Kiel fondinto de la irlanda verdula partio mi ĉeestis en 1982 la 1an kongreson de Eŭropaj verduloj en Belgujo. ”Estis okulfrape, ke la angleparolantoj havis dum la kongreso avantaĝon. Esperanto estintus pli justa solvo. En 1984 Christopher do kunfondis la *Asocion de Verduloj Esperantistaj* (AVE), kiu nun havas 350 membrojn, kaj regule kunvenas dum la Universalaj Kongresoj de UEA. La celo de AVE estas jene skribitaj en la Jarlibro: ”AVE-anoj aktivas en la Verda Movado aŭ Verdaj Partioj, kio signifas,

ke ili subtenas ekologion, daŭripovan ekonomion, malferman kaj justan socion, kaj konfliktsolvadon per nemilitaj metodoj.”

Kion diri pri la vegetaranaj atingoj de Christopher? Iĝante esperantisto li tuj vidis, ke Esperanto povas helpi la vegetaranan movadon. Kompreneble, li membriĝis al *Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio* (TEVA) kaj nuntempe li estas ĝia prezidanto.

Iom pri la Internaciaj Porinfanaj Kongresetoj: Ili estas aranĝitaj por infanoj inter 6- kaj 12-jaraj samtempe kun la Universalaj Kongresoj. Ĝis nun okazis 39 da ili. Christopher partoprenis kiel gvidanto la IIK-n en Varna en 1978. La aranĝo havis amason da mankoj, kiujn grandparte kaŭzis la nespertaj organizantoj. Necesas kolekti la spertojn, lerni el ili, necesas konstanta respondeculo – sekretario por la kongresetoj – jen la konkludoj kaj postuloj de Christopher, per kiuj li dum 10 jaroj invadis la gvidantojn de UEA. Fine li venkis kaj mem iĝis la ĉefa organizanto de la kongresetoj en la plejparto de jaroj inter 1988 – 1998.

Kion Christopher faras nun? Kiel emerito (li estis instruisto pri la angla kaj franca lingvoj) li ĝuas la liberecon sur sia 20-hektara bieno en Irlando. Li ĉiam amas arbojn, “ili ne forflugas kiel birdoj” – diras li, kaj 10 milon da ili li plantis en sia bieno. Ĉefe kverkojn, fagojn, ĉerizojn kaŝtanojn, larikojn kaj juglandojn. Fojfoje li vojaĝas (al Esperanto-kongresoj aŭ, kiel nun, al siaj foraj familianoj kaj amikoj), sed pli ofte li mem akceptas vizitantojn – ĉiujare proksimume 200! Gaja homo, agrabla kompanio, indas lin gastigi – aŭ viziti!

Katja Steele

La vagonaro enveturis laŭ la stacidoma perono. Elkriegas pasaĝero el la vagonarkupefenestro al knabeto:

“Jen estas $ 10. Ĉu vi bonvolos aĉeti du buterpanojn, unu el kiuj vi rajtas mem manĝi!”

La vagonaro estas ekelveturigonta for de la stacidoma perono kiam la knabeto kurege alvenas al la vagonarkupefenestro:

”Jen estas $ 5. Ili havis nur unu buterpanon!”